


# LA DIKA LIBRO

LA "DIKA LIBRO"  
DE PETETO ĴUS  
APERIS EN  
ESPERANTO!



Direktoro: Miguel A. Sancho  
 Vicdirektoro: N. Millán  
 Cefredaktoro: Fco. J. Moleón  
 Cefdeservieto: J. Namaço  
 Pasisto: Jorge Ruano  
 Kunlaborantoj: Apollinaire,  
 Espronceda, A. Juan Madra-  
 no, Cili kaj Diĉo.  
 Konstantaj korektantoj:  
 L.L.Zamenhof kaj Ferdinand  
 de Saussure.

"En la komenco Zamen-  
 hof kreis la Ĉielon -  
 kaj la teron. Kaj la  
 tero estis senforma --  
 kaj ĉereta, kaj mal-  
 lumo estis super la -  
 abismo; kaj la spiri-  
 to de Zamenhof ŝvebis  
 super la akvo. Kaj Za-  
 menhof diris: Estu lu-  
 mo; kaj fariĝis luno"  
 Diĉo

INDEXO

Paĝo	3	.....	Cefa titolo.
"	4	.....	Al koncepto edukado.
"	8	.....	Paligramo.
"	9	.....	Sipulcalte, kaj
"	11	.....	Armitoj kaj ŝipoj.
"	12	.....	La logiko linvas.
"	15	.....	Fuelenstein.
"	18	.....	Gvi ilo por la u- to de konciantaj - burĝoj.
"	20	.....	Poezio.
"	23	.....	Problemo.
"	25	.....	Gramatika korekto.
"	26	.....	Iriindajaj solvej.
"	27	.....	Enoj.
"	28	.....	Estro kaj delegi- taro.

Rimarko: Pri la enhavo de la kunlaboroj respondecas nur la aŭtoro mem. Rilate la ĉefartikolon, la re ak-  
 tidiano aperas fin.

Sidejo: Madrida Esperanto-Liceo  
 C/ Atocha, 98 - 49  
 Madrido - 12  
 Telefono: (911) 2 30 47 98

# ĈEFARTIKOLO

DENOVE... SALUTON.

Unu monaton daŭris la farado de la pasinta HEJS-Juneca numero. Oni mendis de ni -- mur revuon, sed ni deziris atingi belan kaj interesan gazeton. Deziri ne sufiĉas, kaj -- per labora klopodo, ni provis: rezulto estas la antaŭa numero. En nia menso ŝvebas la ideo revivigi tiun pasintecan revuon, kiu multe servis la junan esperantistaron. Ĝia kvalito estas por ni lernendaĵo, kium ni deziras preni. Krom tio, nia intereso estas aperigi novan kaj modernan publikorganon de nia Asocio.

Grandan laboron, kaj espereble fruktodan, ni faris. Ĝis nun la membroj de H.E.J.S. ricevis ion da informado kaj nenion allogan, kontraŭ la pago sia abonkotizo al la Juna -- Organizo. Por ni estis preskaŭ morala devo -- oferi "ion pli" al niaj legantoj, ĉar per -- aliaj sistemoj neniu klopodis tion fari. Dudekok paĝoj iĝis defio por ni: ne ilin plenumi, sed plenplene ilin prezenti de legindaj artikoloj. El tio konsistis nia laboro, krom la beligo de la numero per desegnoj kaj la -- racia organizo de la paĝoj.

Ni klopodis enkonduki novan aeron al la -- revuo. Dumore, sed ne respondece, prezenti -- la problemojn de nia Organizo. Junece interesiĝi pri Esperanto kaj la junaj aferoj estis nia ĉiama priokupo. Ni ne ĉin forgesos dum -- ni redaktos ĉi tiun revuon.

Ĉu ni atingis niajn celojn? Ni deziras -- koni ĉies opiniojn. Bonvolu sendi ilin al -- nia redakcia adreso. Per ili ni povos plibonigi la revuon favore al la legantoj. Ĝis --

nun nia redakto ricevis nur kelkajn gratulojn kaj konsilojn, - eĉ anonimo tion faris sendante artikoleon -. (Esperantuje ni famigis per mencio de HEROLDO (14-1689!).

Ekde nia esperantistigo mi laboras en la farado de revuoj: "Nia Voĉo", "Bulteno" de M.E.L., kaj nun en "HEJS-Juneco". En ili mi lernis, ke laboro estas la sekreto de bonaj rezultoj. Mi konstatis ankaŭ, ke gazeto ne estas unuopultaĝa laboro. Laborema teamo -- sin dediĉis al la redaktado, tajpado, fotokopiado kaj sendado de la revuo. La merito apartenas al ĉiuj membroj de la redakcio, al mi nur laste. Mi devas konstati ne nur la laboron de kelkaj membroj, sed ankaŭ ilian kuraĝon rapide lerni kiel eble plej bone la lingvon. Certe ni ĉiuj respondecas pri la -- bonoj kaj ...la malbonoj.

En la pasinta numero vi eble notis la ekziston de unua paĝo malklare presita (feliĉe ĝi temis pri niaj nomoj!) kaj kelkajn presajn kaj gramatikajn erarojn. Ni petas pardonon: la manko de kopieskvalito malaltigis la koston kaj ebligis nin eldoni dudekok paĝoj; pri la eraroj ni zorgos ĉinumere kaj sekve. Neniun gravan eraron vi povis trovi, sed por via intereso, ni publikigas liston de tiuj, -- kiujn ni trovis.

Senerareco estas grava afero. La efikeco de nia Organizo baziĝas sur kapableco de ĝiaj organoj. Senerare paroli Esperanton devus esti la celo de ĉiu membro de la revuo kaj -- estraro de H.E.J.S.

Ni dankas ĉiujn kunlaboraĵojn, kiun ni ricevis, krom gratuloj kaj apogaj leteroj (ni -- ne forgesas loteridonacon ricevitan!). Nun ni esperas, ke vi intereseme legos la ceteron de la revuo, kiun enmane vi entenas.

Miguel A. Sancho

Direktoro de H.E.J.S.--Juneco

# AL KONCEPTO EDUKADO

Antaŭ longe mi faris malgrandam enketon al kelkaj personoj. Mi volis koni diversajn opiniojn pri la signifo de la vorto "edukado", kaj iliaj malsamaj respondoj multe surprizigis min.

En la koncepto pri edukado influas precipe politikaj, sociaj kaj religiaj pensoj de ĉiu ulo, kiu, kompreneble, havas specialajn kaj malsamajn filozofajn ideojn.

Per tiu ĉi artikolo mi nur klopodas ekmontri kelkajn opiniojn pri ĝi laŭ kelkaj filozofoj tra la historio.

Etimologie la vorto "edukado" havas du signifojn, kiuj devenas el du latinaj verboj.

- Educo, as, are, kiu signifas "mamnutri"
- Educo, is, ere, kies signifo estas -- "elirigi", "direkti", "gvidi".  
(En la latina lingvo "duc" estas estro, gvidisto).

Kelkaj aŭtoroj kiel Cousinet pensas, ke la lernanto povas disvolviĝi libere kaj la edukisto devas permesi kaj helpi tion.

Aliaj opinias tute kontraŭe. Durkheim - ekzemple diras, ke la edukado konsistas en transdono de la kulturo al la plej junaj generacioj. Laŭ li, la edukado devas disvolviĝi la lernanton, laŭ la volo de la politika socio en kiu li vivas, kaj ne laŭ li jam estas nature.

La edukado precipe signifas perfekteco kaj kune kun ĉi tiu ideo estas ankaŭ la bono, t.e. kion konvenas al la homo.

Platono ekzemple diras: "eduki estas heligi kaj perfektigi same animon kaj korpon kiel eble plej bone".

Oni povas kompreni la edukadon kiel gavan ilon per kiu la homo devas atingi sian lastan celon, sed ĝia disvolviĝo dependos - precipe de ĉiu opinio.

Ekzemple por Maraŝon ĉi tiu celo devas - esti venki etike niajn instinktojn; Spencer pensas, ke la plej grava afero estas prepari la vivon; kaj Pio la XI-a diras, ke eduki estas fari verajn kristanojn. Aliflanke Kant opinias, ke la homo nature jam estas - perfekta kaj la edukado devas helpi lian -- disvolviĝon.

Herbart - la fama fondinto de la scienca pedagogio - diras, ke origine la homo ne havas pensojn, sentojn nek dezirojn: "la animo estas simpla, kiel glata tabulo, kiu akiras ĉiujn konceptojn iom post iom per la sperto". Laŭ lia tezo, la edukado konsistas el konstruado de aliaj personoj kaj, se ni analizas ĝin, ni povos vidi, ke, dum la edukisto devas fari ĉion, la lernanto estas - pasiva ulo.

Kontraŭ tio estas la penso de Debesse, - kiu diras, ke la edukado ne kreas homon sed helpas lin por ke li mem kreigu.

Ĝenerale oni vidas la edukadon kiel tute planitan agon, kiel ekzemple Dilthey kaj Planchard, sed oni ne povas forgesi, ke ekzistas ankaŭ alia edukado: la homo vivas en la mondo kaj la naturo, socio kaj kulturo - edukigas lin nekonscie. Tio estas la "Kosma edukado" laŭ Nassif.

Komprenoble la vetero kaj la pejzaĝo influas la personon. Ankaŭ la vivado kun aliaj personoj kaj finfine la kulturo en kiu - li vivas, multe gravas en lia posta disvolviĝado: ekzistas sociaj reguloj kiuj influ-

as, modelas kaj perfektigas ( aŭ kontraŭe; tio dependas de la vidpunkto ) la ulon.

Laŭ mia opinio la edukprocezo, kiu estas senpaŭza, devas perfektigi la "tutan personon". Oni ne devas eduki nur la memoron, ĉar persono ne estas komputilo kiu -- gardas informojn en la cerbo.

Persono devas senti, pripensi, scii kie li estas kaj kien li deziras iri; analizi -- ĉion kaj, se io ne plaĉas al li, eble li -- devas klopodi ŝanĝi ĝin. Finfine, li devas esti vere libera.

### Natividad Millán





# KALIGRAMO de Apo Linaire.

## La kolombo ponardita kaj la ŝprucaĵo.

Dolĉaj ligoj <sup>ponarditaj</sup> **K**araj lipoj floraj  
MIA MAREYE  
YETTE LORIE  
ANNIE kaj vi MARIE  
kie estas  
vi ho  
junaj inoj  
SED  
apud  
ŝprucaĵo kiu  
ploras kaj preĝas  
Ĉi tiu kolombo ekstaras

Ĉiuj rememoroj antaŭaj ? Kie estas Reynal Billy Dalize  
Ho miaj amikoj kiu foriris en la militon Kie estas Cremnitz kiu varbis ĝis  
ŝprucas al la firmamento Kiu nomoj melankoliigas  
kaj viaj rigardoj al la dormanta akvo Kie estas Cremnitz kiu varbis ĝis  
mortas melankolie Eble ili jam estas mortaj  
kie estas Braque kaj Max Jacob De rememoroj miu ankoraŭ estas plena  
Derain kun grizaj okuloj kiel la tago de la ŝprucaĵo ploras sur via malĝojo

TIUJ KIUS FORIRIS EN LA MILITON NUN NORDE BATALAS  
Noktigas hO sanganta maro  
Ĝardenoj kie sangas abunde la cleandro floro militanta



# ŜIPALSALTE!

"Dek kvin homoj sur la kofr' de l' mortinto..." tion kantis la piratoj de "La Trezora Insulo", la fama romano de R.L. Stevenson.

Verŝajne vi scias, ke la piratoj, kiam volis forigi iun, lasis lin sur unu el la nenombreblaj insuloj de la Kariba Maro, al kiuj ili donis fantaziajn nomojn.

Tam okazis, ke la fama pirato Edward Teach, nomata Nigrabarbo, por ne doni al dek kvin siaj homoj ilian parton el kaptajo, forlasis ilin, kun malmultaj armiloj kaj unu ruma ĉarolo, sur insulo konata kiel "La Kofro de la Mortinto".

Nun ni iom pli funde konu tiujn homojn, kiuj, en la XVI-a, XVII-a kaj XVIII-a jarcentoj trasulkis la marojn. Precipe oni devas distingi inter flibustroj, piratoj kaj korsaroj.

## Korsaroj

La korsaroj estis anglaj, francaj kaj nederlandaj aventuristoj, malamikaj al la hispanoj. Ili faris la "Korsaran militon" komisie de siaj registaroj, kaj ne por si mem. Unu el la plej famaj estis Sioro Francis Drake (1540-1596), esploristo kaj ŝipisto kiu grave kontribuis al la kreado de la kolonia angla imperio.

Fojfoje okazis, ke korsaro fariĝas pirato. Tipa ekzemplo estas tiu de la fama kapitano Kidd (1645-1701). Li, komisiite ĉasi piratojn kaj efektiviĝi revenĝajn agojn kontraŭ la franca ŝiparo, ricevis el la brita registaro la ordonpovon de la galerego "Aventuro", sur liu li alvenis al Madagaskaro, kie alianciĝis al la piratoj. Post du piratecaj jaroj, li estis arestita kaj finiĝis lia aventura vivo per pendumilo, la 23-an de majo de 1701.

## Piratoj

La piratoj, male, "laboris" por si mem, sturante la komercajn ŝipojn kaj speciale la hispanajn galeregojn kargitajn per oro kaj gemoj, liujn la ŝipoj portis de Ameriko.

## Flibustroj

Tiuj ci estis nek korsaroj nek piratoj, kvankam havis la karakteraĵojn de ambaŭ. Ielkfoje ili agis por si, aliffoje komisie de iu registraro kaj, ĝenerale, ĉiam kontraŭ la hispanoj. Ili nomiĝis mem "Fratoj de la Marbordo" kaj, en sia plej splendoro epoko, fondis Respublikon en la Insulo de la Testudo, laŭlonge de la Hispana (Haitio). Je la ordonoj de malhumanaj kaj kruelaj ĉefoj, ili obeis firmegajn leĝojn severe starigantajn la didonadon de kantaĵo kaj la konduton sur la insulo. La malobeojn (kiel fumi en ŝipkelo) oni punis laŭ la "Mosea Leĝo", t.e., per kvardek vipbatoj. Mortpunon oni aplikis al la plej gravaj delitoj. Fama pro sia necedeo pri aplikado de la leĝo estis Bartolomeo Roberts, kiu, dum sia pirata vivo, kaptis entute 400 ŝipojn.

Aliaj flibustroj enirintaj en la historion: Sioro Henry Morgan, William Bampier kaj Basil Ringrose. Inter la piratoj meritas specialan atenton la jam citita kapitano Edward Teach, nomita Nigrabarbo. Li estis fama pro sia longega barbo, kiun li ornamis per rubandoj de diversaj koloroj, kiujn poste ligis ĉirkaŭ siajn orelojn. Lumbatale li portis baŭteon, de kiu pendis tri parojn da pafiloj. Sub la trikorna ĉapele li portis ŝnurajn plektaĵojn, kiujn ekbruligis. Tiamaniere lia vizaĝo, ĉirkaŭita de flamoj, alprenis terurigan aspekton.

Malpli fantaziaj ol li, tamen same krue-  
legaj, estis la du solaj pirataj virinoj ki-  
ujn la historio memoras: Anna Bonny kaj Ma-  
ry Read. Ĉiuj antaŭe cititaj batalis sub sa-  
ma flaga tipo konsistanta ĝenerale el nigra  
ĝtofo, sur kiu estis pentritaj kranio kaj  
du tibioj, aŭ skeleto portanta ĉemane gla-  
son da rumo kaj ĉe l' alia sturmosabron.

#### ARMILOJ KAJ ŜIPOJ

Daŭrigante la saman temon, ni diros, ke  
la uzataj armiloj estis pafiloj, sabroj kaj  
glavetoj, hakiloj, arkebuzoj, malgrandkali-  
braj kanonoj (pafantaj najlojn kaj metalru-  
bon), kaj grandkalibraj kanonoj (pafantaj  
ferbulojn). Preskaŭ ĉiam la batalo finiĝis  
per ŝipsturmo, tio estas, invado kaj konke-  
ro de la malamika ŝipo.

Ni finu tiun ĉi mallongan rondvizitadon  
tra la mondo de la navigistoj per listeto de  
ties ŝipoj: la plej malgranda estis la gal-  
ereto, kun remuloj kaj nur unu latina velo.  
Poste la rapidega galero, kun remuloj kaj  
du veloj. Tria estas la galeregeto (1), kun  
tri latinaj mastoj, 32 remoj ĉiuflanke kaj  
36 kanonoj. Laste ni trovas la galeregon,  
pli granda ol ĉiu antaŭa, kun kvar mastoj  
kaj armilaro konsistanta el 70 kanonoj.

(1) Ŝipo pli malgranda ol la galerego, tamen  
pli granda ol la galero.

Francisco Javier Moleón

# LA LOGIKO LINGVAS

Se vi sufiĉe bone konas la historion de la artefaritaj lingvoj, vi povas eble konstati la grandan intereson, kiam la filozofoj montris, solvi la prikomunikan problemon. Ne estas hazardo, ke la plejparto el tiuj, kiuj entuziasmiĝis per la ideo krei internacian lingvon, sin dediĉis al la logika investigado. La kialo estas simpla: ili bezonis internacian komunikan laborilon kapablan esprimi ĉiujn logikajn nuancojn.

Propozicion oni pevas komuniki nur per lingvaĵo. Tiu lingvaĵo reflektas la meĥanisman de nia penso. Tio ne signifas, ke logiko okupiĝas pri lingvoj, sed pri la kaŭzoj, kiuj verigas aŭ neas iun propozicion. Tamen oni devas krei apartan lingvosistemon ne enhavantan dubesencajn elementojn. La logikaj esploristoj devis serĉi tial apartan simbolaron kies bazoj ne estas la natura lingvo sed iaspecaj formuloj.

En la unuaj momentoj oni esprimis propozicion per la popola parolo. Parmenido kaj Aristotelo uzis la grekan, kiel logikan sistemon. Oni uzis nek variantojn nek operaciojn. Simboloj ne ekzistis.

Sed ĉiutaga lingvo ne taŭgas kiel logikofaka kodo, ĉar ĝi dubesencigas la informojn kaj apartigas la Logikon de ĝia vera celo. Boole estis la unua, kiu ideis novan logikosistemon bazitan sur la matematika simbolaro. La variantoj ekmal esprimis numerajn valorojn por ilia anstataŭi per propozicioj. La numeroj prenas novan signifon: la unuo reprezentas veron kaj la nulo, malveron.

Frege atakante la ideon bazigi la matematikon per la Pri-ara Teorio, opinias, ke ĝi estas parto de la Logiko. Tial estas absurde uzi matematikajn simbolojn en la logika lingvaĵo. Lia simbola

kodo vere originalas:

Signo	Signifo
----- A	Propozicio A
└----- B	Jesa propozicio B
└---┘ C	Nea propozicio C
└---┘ D	Kondiĉa propozicio
└---┘ E	(Se B tial E)

Tiu stranga kodo ne konvinkis la aliajn logikistojn, kvankam oni akceptis elemente liajn ideojn. Por savi ilin de la forgeso estis neceso ŝanĝi la kodon. Pri tiu tasko okupiĝis Peano, kiu kreis novan elmatematikan simbolaron. Peano ne konsideris nur la ideon unuigi la logikan lingvaĵon sed kredis pri la neceso serĉi internacian lingvon por la tutmonda kompreno. Pro tio li publikigis sian ĉefverkon ne nur itale sed en la artifarita lingvo "Latino sine Fleksione" (Latino sen deklinacioj).

La simbolaro de Peano ne estas perfekta. Multaj aliaj aŭtoroj elpensis novajn plibonajn kodojn. Russel kune kun Whitehead plenumis la plej grandan projekton pri la unuigo de la Logiko: "Principa Matematika". En ĝi oni plibonigas la simbolaron de Peano.

La membroj de la germana kaj pola skoloj proponis aliajn nuntempe ofte uzatajn sistemojn, nome tiuj de Hilbert, Schölz (facile trovebla en la hispana lernolibroj pri Logiko), Traski, Lukasiewicz, Bochenski, k.t.p.

Mi espereble montris, ke la komunika problemo ne prezentiĝas nur en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en la fakaj necesoj de la sciencoj.



Skemo pri la simboloj de la plej gravaj logikaj operacioj en la plej oftaj logikaj kodoj.

	1.	2.	3.	4.	5.	6.
Pola Skolo	Np	Kp $\bar{q}$	Ap $\bar{q}$	Cp $\bar{q}$	Ep $\bar{q}$	Jp $\bar{q}$
Princ. Mat.	$\sim$ P	P $\cdot$ q	P $\vee$ q	P $\supset$ q	P $\equiv$ q	P $\neq$ q
Hilbert	$\bar{P}$	P $\&$ q	"	P $\rightarrow$ q	P $\leftrightarrow$ q	"
Schölz	$\neg$ P	P $\wedge$ q	"	"	P $\leftrightarrow$ q	"

Ĉar ankoraŭ ne ekzistas esperanta logika nomenklature, ĉiu numero reprezentas la ĉijenajn hispanajn nomojn: 1. Negación; 2. Conjunción; 3. Alternativa; 4. Condicional; 5. Bicondicional, y 6. Contrariedad.

Bibliografio: Se vi deziras vin enkonduki la studadon de la Logiko, la plej elementaj lernolibroj uzataj en Hispanio estas: "La Lógica Simbólica" de Garrido, alia same nomiganta de Deaño, kaj mi rekomendas "A Precís of Mathematical Logic" de Bochenki (hispana traduko en la Eldonejo Paraninfo, kaj de la sama aŭtoro "Enkonduko al la Historio de la Logiko" (ĉu Eld. Gredos ?).

Miguel A. Sancho

MI ĝam havas  
oligilon por la  
venonta tendaro.  
Kaj vi?



# FRANKENSTEIN

"Frankenstein" (Fránkenstejn), fama terureska romano, estas verkita de Mary J. Shelley (naskita en Londono en 1797), kaj estas konata en la tuta mondo, tamen oni miskomprenas ĝi tiun verkon pro la filmoj kiuj ĝin pritraktas.

Unue, la monstro ne nomiĝas Frankenstein, ĉar F.(1) estas la doktoro kiu ĝin(2) kreas. Ĝi estas sennoma.

Due, la monstro ne estas fiviraĉo. Ĝi estas - aĉulo, kadavra membrero, sed ne fiviro. Ĝi estas ankaŭ nek besto nek "roboto", kiu moviĝas malrapide kiel somnambulo. Laŭ la aŭtorina priskribo, ĝi estas alta, granda, forta, kun teruraj kaj malbelegaj vizaĝo kaj korpo.

Ĝi ankaŭ ne portigas laŭplaĉe, ĉar ĝi estas - bonkora, sentimentala, naiva persono. Ĝi "naskiĝis" mense kiel bebo aŭ infaneto. Sed ĝi faras timial:

Malzorgita de la doktoro, kiu hororiĝis pro lia kreaĵo, kiam ĝi intencis paroli kun la popolo, ĝi preskaŭ estis ŝtonumita de ili, kiuj tian monstron timegis. Poste, memlerninte, aŭdinte al fa-

(1).- Frankenstein. (2).- Ĝi estas "la monstro".



milmembroj, ĝi ekparolis la anglan, kaj trovinte du librojn, ĝi eklegis. Tamen, kiam ĝi provis -- kontakti kun la familio, ili malakceptis ĝin. Poste, helpante infaninon, ŝia patro pafis kaj vundis ĝin. Freneze, kun sanga soifo, la monstro -- mortigas alian infanon, parenco de la doktoro, al kiu ĝi proksimume diras:

- "Kreinte min, CI devas zorgi min. Do, fabriku por mi monstrinon, ĉar mi estas sola kaj mala mata de la homoj, kaj mi bezonas amikinojn kunkiu mi povu vivi trankvile, ekster la homaro. Se CI ne kreus "familion" (mi pensas ke ŝi nur estus - aĉolino), mi mortigus CIM kaj CIAN familion."

Do, F. komencas sian laboron, sed kiam tio - estas finita, li pentas, pensas pri la homara es tonteco (eble la gemonstroj havus idojn), kaj de truas la korpon de la monstrino.

Tial, la monstro mortigas liajn amikojn kaj parencojn. La doktoro F. glitveturante ĝin persekutas ĝis la Norda Poluso. Tie, li ne povas atingi ĝin, ĉar la glacia maro disrompiĝis, izolante lin inter la glaciintoj. Poste, li estas savata de ŝipo, kaj ĉe la ŝipo, li rakontas lian vivon al la ŝipestro, kiu skribas la rakonton kaj diras al li ke la monstro ne povis saviĝi.

Tamen, ian, nokte, la monstro eniras en la ŝipon, kie F. estas mortonta, kaj al ili (al la doktoro kaj la ŝipestro) diras ke ĝi sufiĉe veniĝis, kaj ke ĝi nemortigos per brulstako. Fine, la monstro, izolita, foriras por morti, dum ĝia "dion" kaj ralaniko, la doktoro Frankenstein, ankaŭ mortas.



Mi opinias, ke en la unua parto de la rakonto, dum la monstro mortigas nenium, ĝi pravas; unue, la doktoro kreis ĝin nepensinte kiel estus sia kreaĵo kaj kio estus ĝia estonteco. Li kredis ke li estis dio (sed ne Dio), kaj kiam li vidis - kiam estaĵon li vivigis, li ĝin forlasis. Post aliaj jaroj, dum kiuj ĝi fidelendis paroli kaj legi, kaj sciigis ke la homaro ĝin konsideris kiel fi-na hombesto, li ne helpis la monstron ĉar li ne deziris akcepti tian vivulon kiel "sia". Due, la monstro neniam ricevis edukadon kaj protektadon de la doktoro.

Tamen, en la dua parto, ĝi misamis mortiganta personejo, ĉar tiel ĝi igas la homojn siaj malamikoj.

Fine, nenio estas prava, ĉar ili atakas kaj ĉenas sin reciproke, unu la alian, tverŝu ili estas frenezuloj.

La nomo "FRANKENSTEIN" ne terorigas min, ĉar ĝi estas parte de la homa indulo.

J. Kamaĉo.

Teksto, desegnaĵoj kaj afiŝo de J. Kamaĉo.



## GVIDILO POR LA UZADO DE KOMENCANTAJ BUKRATOJ

La Universalan Kodon pri la Politik-burokrata prelego mirige oni publikigis en "Zycie Warszawy" (Revuo - de Varsovio), la ĉefa ŝtata ĵurnalo de Pollando. Ĝi estas studenta ŝerco, kiu mokas pri la meĥanismoj de la oficiala lingvo. La uzmetodo estas simpla: oni komencas per la unua ĉelo de la unua kolono daŭrigante per iu - ajn de la dua, k.t.p... Je la fino rekomencu per alia - frazo. Ne gravas la ordo. 10.000 kombinoj por flua prelego de pli ol 40 horoj.

### Unua kolono:

- Karaj kolegoj...
- Alifake...
- Tial do...
- Tamen ni ne forgesas, ke...
- Sammaniere...
- La praktiko en la ĉiutaga vivo pruvas, ke...
- Ne nepre oni bezonas notigi la pezon kaj signofor de tiuj problemoj, ĉar...
- La riĉaj kaj diversaj spertoj...
- La strĉbo pri organizo, sed precipe...
- La superaj ideologiaj principoj, same kiel...

### Dua kolono:

- La realigado de la celoj de la programo...
- La malsimpleco de la estrataj studoj...
- La konstanta plialtigado kvalite kaj kvante de nia agado...
- La nuntempa strukturo de la organizo...
- La nova priaktiva modelo de la organizo...
- La konstanta disvolvigado de la diversaj priaktivaj manieroj...
- La konstanta garantio de nia informa kaj propaganda agado...
- La reformado kaj disvolvigado de la strukturoj...
- La konsulto al granda kvanto de aktivuloj...
- La komenco de la ĝenerala aktivado pri la eduko de la sintenadoj...

### Tria kolono:

- Devigas la analizon...
- Plenumas esencan rolon en la realigado...
- Postulas la determinon...
- Helpas la preparadon kaj realigadon...
- Grantias la partoprenon de grava grupo en la realigado...
- Plenumas gravajn devojn en la determinado...
- Bazigas la konstaton de la graveco...
- Oferas interesan eksperimenton pri la neceso...
- Bezonigas la modernigan procezon...

### Kvara kolono:

- De la nuntempaj financaj kaj administraj kondiĉoj.
- De la estonta evoluo.
- De la sistemo de ĝenerala partopreno.
- De la devsintenaĵoj de la organizantoj.
- De la novaj proponoj.
- De la edukaj projektoj survoje de la progreso.
- De la necesa edukistemo de la membraro.
- De la kondiĉoj pri taŭgaj agadoj.
- De la modelo pri disvolviĝo de la agadsistemoj.

(Tradukita libere el la hispana.)

Miguel A. Sancho

Almanaque Agromán 1, 977



# POEZIO

"Kien surmetas nia ĉevalo la krurojn  
ne plu maskiĝas herbo".

(Vortoj de Atilo)

Hura, kozakoj de l'dezerto!  
-----

- Hura, kozakoj de l'dezerto! Hura!  
En Eŭropo estas splendoro pred':  
sangega marĉo ties kampoj estu,  
ties armeo frugilega festen'.
- Hura! Surĉevalu, filoj de l'nebuloj!  
Ellasu bridon, iru lukti jam:  
vi vidas ĉi utilan teraron?, ĝin uloj  
tre riĉaj loĝas, malfortigitaj ja.
- Domoj, palacoj, ĝardenoj kaj kampoj  
ĉio tiea estas bela kun bril':  
estas la inoj ĉielaj seraĵoj,  
sun' prilumas ĉielon el safir!  
Hura, kozakoj de l'dezerto!...
- Niaj estu ties oro kaj plezuroj,  
ni ĝuu pri tiu sun' kaj tiu kamp';  
estas la soldatoj mem ol inuloj,  
la reĝoj malnobla komercistar'.
- Vidu ilin fuĝi por kaŝi oron,  
vidu, ĉiu 'stas poltrona plorul'...  
Hura! Kuregu: ilin kaj trezoron  
tretu nia ĉevalo per sia krur'.  
Hura, kozakoj de l'dezerto!...
- Diktos tie nia kaprico leĝojn,  
nia hejmo estos alkazar',  
la sceptro kaj krono de la reĝoj  
ruliĝos kiel ludiloj de infan'.

- Hura! Ek! ni plenumu dezirojn niajn:  
la plej belaj virinoj amos nin,  
kaj ne vidos turpaj vizaĝojn niajn,  
ĉar ĉiam estas bela la venkint'.
- Hura, kozakoj de l' dezerto!...
- Ni disŝiros Eŭropon venkitan,  
kiel tigro, kiam voras ĉi best';  
en sangon ni ensorbigos veston nian  
kiel ruĝa mantelo de imperiestr'.
- Niaj noblaj ĉevaloj henantaj  
loĝos ĉiu en ega reĝa ĉambr';  
cent sklavoj, siajn fruntojn klinantaj,  
trenos pro nia okul' en rigard'.
- Hura, kozakoj de l' dezerto!...
- Venu, lugegu, soldatoj de l' dezerto,  
kiel nuboj en nigra konfuzeg',  
ĉiuj lasitaj bridon, l'okulo sen certo,  
ĉiuj puŝbatantaj sin en amaseg'.
- Iru en densa nebulo kaŝitaj,  
kiel trombo, kiun forprenas uragan',  
kiel glaciplatoj malmoligitaj  
kiuj inter rokoj iras kun fal'.
- Niaj patroj iam rajde vojis  
ĉis ili venis al urb' de imperi';  
konate, ke ili pli puran sunon trovis,  
kaj palacojn el oro kaj el vitr'.
- Vadis Tiberon iliaj ĉevaloj,  
rigida antaŭ ili mutiĝis la ter';  
ilian dormemon per fantazikantoj  
lulis la famo de l' granda venkeg'.
- Hura,
- Kio! Ĉu vi ne sentas lancon ekstremiti,  
en via man' plendantan por mortig'?  
Ĉu vi ne vidos inter nebulo aperiti  
mil viziojn gratulantajn nin?

- Ĉirmilo de tiuj mizeraj landoj  
iam estis tiu faligita mur';  
kaj blazonojn kaj gloron de Pollando  
vidu turnigitajn en sango kaj fum'.  
Hura,
- Kiu en doloron turnis ties ĝojon?  
Kiu ties filojn enĉenigis post venkar'?'  
Kiu finis ties tagojn en gloro?  
Kiu ilin dronigis en ilia sang'?
- Hura, kozakoj! gloron al plej kuraĝulo!  
Vidos nin tiuj homoj de Eŭrop':  
Hura! niaj ĉevaloj sur ilian frunton  
siajn hufoferatojn markos kun fort'.
- Al ĉiu bato de raspa lanco,  
al ĉiu fuĝo en batalon kun varmeg',  
la langa porcio de kruda larno  
vi sentos bolegi sub via sei'.
- Kaj poste en temploj luksaj,  
estante tablo por ni ia altar',  
nian soifon mindigos vinoj bongustaj,  
satigos nian malsaton blanka pan'.  
Hura,
- Kaj niaj patrinoj vidos nin venkantajn,  
kaj tiun kadukan Eŭropon antaŭ ni,  
kaj alkuros de ĝojo tremantaj  
por rigardi reĝon en ĉiu fil'.
- Niaj filoj konos agojn niajn,  
heredos la kronojn de Eŭropo de ni,  
kaj konkeri ankau regionojn aliajn  
ĉevalon laŭ lancon pretigos por ni.
- Hura, kozakoj de la dezerto! Hura!  
En Eŭropo estas splendora pred':  
panega marĉo ties kampoj estu,  
ties armeo frugilega festen'.

Espronceda



# PROBLEMO

La aĝoj de miaj filinoj

---

Tiu ĉi problemo estis proponata al Einstein de liaj lernantoj. La granda fizikisto sukcesis solvi ĝin, kiel estas supozeble. - Sed ŝajnas ke, aŭdinte ĝin, li ne povis eviti miran ekkrion.

Ĝi diras tiel:

Du profesoroj babilas pri siaj familioj .

- Nu, kion da jaroj havas viaj tri filinoj? demandas unu el ili.

- La produkto de iliaj aĝoj estas 36, kaj - la sumo, hazarde, egalas al la numero de via domo.

Post pripensi iomete, tiu, kiu faris la demandon, diri al sia kolego:

- Konataĵo mankas al mi.

- Vi tute pravas - akceptis la profesoro - Mi forgesis diri al vi ke la plej aĝa el miaj filinoj ludas pianon.

Demando: Kion da jaroj havas la tri filinoj de la profesoro?

---

Solvo: La eblaj malsamaj solvoj estas:

aĝoj	=	sumoj	aĝoj	=	sumoj
1,1,36	=	38	1,6,6	=	13 ✗
1,2,18	=	21	2,2,9	=	13 ✗
1,3,12	=	16	2,3,6	=	11
1,4,9	=	14	3,3,4	=	10

PROBLEMO

Ĉar al la demandanto mankas konataĵo, ni devas supozi ke la numero de lia domo estas 13 (tial li dubas, ĉar li havas du solvojn). Aŭdinte ke estas plejaĝulino, la afero-klarigis al li: la aĝoj estas 2, 2 kaj 9.

Tiu problemo aperis en la revuo "Algo"-n<sup>o</sup> 369.

A. Juan Medrano

ALMANAQUE AGROMAN 1977.




## GRAMATIKA KOREKTO

En la numero 246, julio-aŭgusto 1981, de la revuo "Boletín" (Bulteno) de Hispana Esperanto-Federacio estas mallonga artikolo sur la paĝo 22 pri la broŝuro "La Faraono", de B. Prus. En la bildrakonto la aŭtoro de la artikolo ŝajne trovis eraron.

Mi ripetos tie ĉi laŭvorte, kion li diris: "Tamen, min mirigis tio, ke liajn plej ofte uzatajn vortojn, kiaj estas Egipto kaj egiptanoj, oni modifis ĉe ilia **transskribo** per Egiptio kaj egiptoj. En Plena Gramatiko RIM. V 69, estas jena regulo: En landoj de Ameriko kaj Afriko la landoj donas la nomon al ĉiaj loĝantoj. Ekzemple: El Kanado, kanadanoj; el Maroko, marokanoj; el Peruo, peruanoj, ktp. Do, el Egipto, egiptanoj".


En "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto" sur la paĝo 459, de la 26-a ĝis la 30-a linioj, troviĝas jena teksto: "Tial li elpensis la regulon, ke por la Malnova Kontinento (Eŭropo, Azio kaj la antikve civilizita parto de Afriko) oni formu la landnomon el la popolnomo per -uj; male, por la Novaj Kontinentoj (Ameriko, Aŭstralio kaj la cetera parto de Afriko) oni formu el la primitiva land-nomo la popolnomon per -an".

Ĉar Egiptujo troviĝas en la "antikve civilizita parto de Afriko", la popolnomo do devas esti "egipto", kaj la landnomo "Egiptujo" (aŭ Egiptio).




# SOLVOJ

INDUSTRIALISMO



LITERARIO



ERAROJ (N-ro 114)

Sur la paĝo	oni legas	oni devas legi
3	ĝojĝis	ĝojis
5	speritistoj	spiritistoj
	a endas	atendas
6	generalesperan	ĝeneralesperan
8	kontraŭstateco	kontraŭŝtateco
	sciencieco	scienceco
	daŭrigi	daŭri
	producion	produkcion
9	se siaj	de siaj
	ĝi iĝos	ke ĝi iĝos
	el universo	en la universo
	en ĝia interno	en ĝian internon
12	estitolo	titolo
15	kaj mi ankaŭ	kaj ankaŭ mi
17	radioelsendejo	radioelsendejoj
19	konitaj	konataj
22	...orelojn	...orelojn?
24	pilgrimadon	pilgrimadon
25	reston	ceteron
	granda	grandajn
	gustumu	gustumas
	pilgrimade	pilgrimado
26	kredu al Dio	kredu al sola Dio

LA VERKARTO

Oni povas verki multajn inĝeniaĵojn, se oni estas dotita. Kvankam konvenas enŝovigi temp' al tempe stultajon, por ne ŝajni malsimpatia.



ESTRARO

PREZIDANTO

Jordi Ferré i Martínez  
Carreras Candi, 25  
Barcelona - 28

VICPREZIDENTO

Ana María Ranero Antolín  
Duques de Nájera, 20 8ªA  
Logroño.

SEKRETARIO

S. Guillermo i Viñeta  
Escultor Canet, 20

VICSEKRETARIO

F. Miguel Muñoz Garre  
Carretera de Baniel, 47  
Alquerías. Murcia.

KASISTO

Carlos Aragay Girona  
Bassegoda, 40  
Barcelona - 28

H.E.J.S.- REPRESENTANTO  
EN TEJO.

Carlos N. Moya Seguí  
SIDEJO DE H.E.J.S.  
Carreras Candi, 34-36  
Barcelona - 28

H.E.J.S.- DELEGITAJ

ELCHE

Antonio Verdú Caselles  
José Bernard Amorós, 38  
Elche. Alicante.

LOGROÑO

Ana María Ranero Antolín

MADRID

Miguel A. Sanche Pardo  
Marcelo Usera, 163  
Madrid - 26

MALAGA

F. Albert Reyna  
Bda. La Paz; Bloque 2  
C/ Beethoven, 6  
Málaga - 4

MURCIA

F. Miguel Muñoz Garre

VALENCIA

Carlos N. Moya Seguí  
Avd. del Cid, 106  
Esc. 1, 7ª  
Valencia - 18

Pariğu membro de  
H.E.J.S.!